KONGRESAJ EKSKURSOJ

PROMENO TRA TIJUANA

Spertu ĝin vi mem! Dum la Kongreso 2007 en Tijuana, Meksiko, vi povas konatiĝi intime kun la vidindaĵoj kaj sonoj de ĉi tiu urbego, promenante tra la stratoj de la urbocentro, ne malproksime de la kongresejo Hotelo Pueblo Amigo.

La promeno daŭras proksimume 2 aŭ 3 horojn

La tuta promeno estas detale priskribita en Esperanto en sur-reta broŝuro havebla ĉe la kongresa retpaĝo:

http://esperanto-usa.org/kongreso2007/promeno.pdf kaj en presita formo ĉe la Kongreso mem.

Nepre kaptu la oportunon sperti Tijuana en ĉi tiu intima maniero, ne tra la fenestroj de turista aŭtobuso, sed persone kaj proprapiede!

Nia Esperanta ĉiĉerono klarigas ĉion.

LA PILKEGON BONVENAS NIN!

La Kultura Centro de Tijuana troveblas je marŝebla distanco de la kongresejo.

Ni vizitu la kulturan kaj artan centron kie famaj artaĵoj estas montrataj, inkluzive pentraĵojn, fotojn, skulptaĵojn, kune kun vasta diverseco de teatraĵoj, simfonioj, recitaloj, operoj and baledoj.

Ĝi ankaŭ inkluzivas Omnimax-teatron, artan galerion kaj librovendejon.

Nia speciala grup-prezo por viziti la muzeon estas nur $15 pesoj ($1.50 Usonaj dolaroj). Vi devas pagi kiam vi registros.

La gvidanto parolos Esperante, hispane, kaj angle!

Ni ankaŭ havos elekton spekti la sekvajn filmojn tie, senpage:

- **La Graveco de la Fideliĝo**
- **Gerda Malaperis**
- **La Duon-okulvitroj.**

POST-KONGRESA EKSKURSO

Playas de Tijuana

Puerto Nuevo (Nova Porto)

Ensenada

San Nicolas Resort

La Bufadora

80 mejloj (130 kilometroj) for de Tijuana - Ensenada 30-31a julio

Meztage je la fino de la kongreso, revenante meztage la 31a al la kongresejo aŭ al la landlimo

Ni iros per buso kun Esperanto ĉiĉerono vidante la finan parton de la muro kiu dividas Usono de Meksiko. Ĝi troveblas ĉe la urbo Playas de Tihŭana. Poste, ni tagmanĝos ĉe Nova Porto sude laŭlonge de la marbordo survoje al bela Ensenada por la nokto. Se tempo permesos, ni plu iros al la fama "Bufadora", kie la ondoj de la Oceano sprutsas akvon alte en la aeron - tre impona vidindaĵo.

Kosto po persono (en dividita ĉambro) estas US$100. La kosto inkluzivas:

- **La bustransporton en privata buso se nombroj da partoprenantoj sufiĉas**
- **Veturadon laŭ la belega marbordo, ofte ĉe altaj klifoj**
- **Komfortan hotel-ĉambron en Ensenada**
- **Ĝajan komunan vesperamanĝon**
- **Spritan Esperantan ĉiĉeronon, kaj**
- **Ĝojon vojaĝi (ludi kaj kanti) kun Esperantistoj.**

Pago devas esti farita almenaŭ unu monato antaŭ komenco (junio 30a). Aliĝu kaj pagu al ELNA. Se vi jam aliĝis, sendu kroman pagon al ELNA kun klariga letero. La kosto dependas de minimuma partoprenado de 20 pasaĝeroj, kaj pago estas neredonebla krom se ni devas nuligi ĝin pro manko da partoprenantoj. Por pli da informoj kaj konfirmo de partoprenado, bv. kontakti Mar Kardenas: Mar@GrupoAmikema.org